

Esperantigo de la ĉeĥoslovakaj loknomoj
Převod československých místních jmen do esperanta
Josef Kavka (Ĉeĥoslovakio)

1. Enkonduko

Estas mirinde, kiom da literaturo ekzistas pri la geografia nomenklaturado en Esperanto. Ĉiujare aperadas abundo da novaj traktaĵoj, recenzoj aŭ almenaŭ kritikaj glosoj pri la temo. Ĉiam ankoraŭ ne establiĝis ĝenerala opinio, ke la loknomoj estas asimilendaj de Esperanto, ĉiam ankoraŭ oni persistas rekomendi, ke ili restu prefere original-formaj. Tamen, la Esperanto-literaturo, ĉu scienca-teĥnika, ĉu beletra, montras nekontesteblan tendencon: la nombro de la loknomoj asimilitaj kreskas. Oni ne miru pro tio; ja ĉiu vivanta lingvo inklinas al asimilado de fremdaĵoj.

2. Geografia nomenklaturado en Ĉeĥoslovakio

La loknomoj, koncernantaj la ĉeĥoslovakajn teritoriojn, estas originale aŭ ĉeĥaj (en Bohemio, Moravio, Silezio), aŭ slovakaj (en Slovakio). Ambaŭ lingvoj tiom proksime parenkas, ke la ĉeĥo povas kompreni ĉioman aŭ preskaŭ ĉioman el parolo de la slovakoj, kaj male. La reciprokajn interkomprenadon subtenas interŝanĝo de la libroj, gazetoj, de radio- kaj televid-programoj, filmoj, teatraĵ-prezentoj k.m.a. Kiam temas pri esperantigo de la ĉeĥaj kaj slovakaj loknomoj, estas do tute nature, ke ambaŭokaze oni procedas aŭ same, aŭ tre simile. Diferencoj en la prononco kaj grafismo estas negravaj.

Memkomprene, ankaŭ la ceteraj slavaj lingvoj meritas atenton de tiu, kiu intencas esperantigi la ĉeĥoslovakajn loknomojn. Precipe la rusa kaj la bulgara gravas en tiu rilato: aplikante nelatinajn alfabetojn, ili ĉiokaze devas transkribi siajn nomojn laŭ la reguloj de la esperantlingva ortografio. Jen kial POŝ-ATLASO DE LA MONDO (1971) devis asimili tiom da loknomoj de Sovetio, Ĉinio k.t.p. La principojn, obeitajn en ĉi tiu libro, oni eksplikas en ties antaŭparolo kaj en *J. KAVKA – T. PUMPR* (1972). Pli freŝdate, *T. MICHALSKI* (1975) prezentis bonegan regularon por esperantigo de la loknomoj pollingvaj. Tre analoge oni procedu ankaŭ okaze de la ĉeĥoslovakaj.

3. Regularo

Ni provu vicigi la unuopajn regulojn laŭ kresko de komplikaj. Kutime

oni asertas, ke esperantigendaj estas sole la nomoj plej oftaj. Tamen ŝajnas, ke ne solaj frekvenco aŭ fameco decidas pri “asimiligemo” de loknomoj en Esperanto. Gravan rolon ĉi-okaze plenumas ankaŭ **facileco** de la procedo: Ju pli simila al originalo estas loknoma formo esperantlingva, des pli klaran inklinon al aplikado de tia asimilaĵo oni povas konstati. Plej akre rifuzata estas nomo apenaŭ rekonebla, ĉu pro grafisma aŭ prononca misformiteco, ĉu pro laŭsenca traduko.

3.1. Plej simpla okazo estas ja jena: **Asimilita formo grafisme identigas kun sia originalo**. Same kiel la itala *Milano*, la urugvaja *Montevideo* k.t.p. koincidas kun la Esperanto-formoj, ankaŭ la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj povas liveri konsiderindan nombron da ekzemploj. Temas pri la nomoj de la neŭtra genro, kiuj en nominativo singulara havas la finaĵojn “-o”: Bežno, Blansko, Blatno, Brežno. Bročno, Cetno, Dolsko, Dubno, Hlinsko, Hradsko, Kladno, Korno, Lipno, Lubno, Radlo, Ransko, Sedlo, Skalsko, Tursko, Znojmo k.m.a. La ĵusnomitaj ekzemploj kongruas tiom perfekte, ke ankaŭ ilia akcento estas originale unuasilaba. Okaze de la tri- kaj pli-silabaj nomoj aperas diferencoj inter la naci- kaj esperant-lingva akcentado: Benecko, Borovno, Borovsko, Bukovno, Bukovsko, Hradecko, Hurbanovo, Kotelsko, Lozorno, Metelsko, Milevsko, Pohorsko, Rovensko. La formoj nacilingvaj estas distingeblaj per kursiva preso: *Benecko*, *Urbanovo* (t.s., ke en ambaŭ laste nomitaj ekzemploj oni akcentas la unuan silabon).

Rerigardante ĉiujn ekzemplojn de la tipo 3.1., ni konstatas, ke en ili ofte ripetigas la neŭtraj sufiksoj original-lingvaj: “-sk-”, “-dl-”, “-n-”.

3.2. **Aldono de la substantiva finaĵo “-o”** estas ankaŭ tre simpla speco de esperantigo. Jen originalaj ekzemploj: *Adamov*, *Bardejov*, *Betliar*, *Bludov*, *Bor*, *Bzenec*, *Fulnek*, *Hnilec*, *Hradec*, *Hron*, *Hronec*, *Humpolec*, *Jirkov*, *Leopoldov*, *Liberec*, *Litovel*, *Livov*, *Loket*, *Makov*, *Martin*, *Medzev*, *Mikulov*, *Miroslav*, *Most*, *Nejdek*, *Nepomuk*, *Neveklov*, *Ostroh*, *Pacov*, *Papin*, *Pezinok*, *Plumlov*, *Pukanec*, *Rajec*, *Rozvadov*, *Slanec*, *Sokolov*, *Stod*, *Stropkov*, *Turiec*, *Turnov*, *Vimperk*, *Vranov*, *Zborov*, *Zohor*, *Zvolen*. Senescepte ĉiuj apartenas al la vira genro. La plej ofta el la loknomaj vir-sufiksoj estas – kiel vidate – “-ov”. Tre ofta estas ankaŭ “-ec”, homonima kun la sufikso de Esperanto. Internacian publiikon eble interesos, ke la koncerna “-e-” estas moviĝema, t.s., ke ĝi malaperas en iuj deklinaciaj kazoj. Genitivo de la slovaka nomo *Bzenec* sonas *Bzenca*, de la ĉeĥa nomo *Humpolec*: *Humpolce*. Simile funkcias “-o-” en la slovaka sufikso “-ok” : nominativo *Pezinok*, genitivo *Pezinka*. Analogaj ekzemploj ĉe aliaj sufiksoj: *Litovel*, *Litovle*; *Loket*, *Lokte*; *Nejdek*, *Nejdku*.

La nomoj de ĉi tiu asimilad-tipo estas do: Boro, Libereco, Mosto, Pacovo, Turnovo. Intence mi ĵus citis ekzemplojn homonimajn kun Esperanto-radikoj aŭ radik-kunmetaĵoj, dezirante emfazi, ke sole pro homonimfobio ne estus prudente, se oni alpaŝus al iuspeca kripligo de la formoj originalaj.

3.3. Ŝanĝo de la fina vokalo al la substantiva finaĵo “-o”.

La finvokala problemo koncernas ajnan nacilingvon (kp. ekz. *N. KA-WASAKI* (1949-1955). Al preskaŭ konsekvenca solvo strebas la traktaĵo jam menciita (1972), p. 8-9). Nun ni esploru, pri kiuspecaj nomoj temas. Ofta sufikso de la genro ina estas “-av-”, kiu akceptas la in-genran finaĵon “-a”. Ekzemploj: *Bratislava, Morava, Ostrava*. Jen ĉi-tipaj asimilaĵoj: Jihlavo, Ondavo, Opavo, Oravo k.s. Aliaj originaloj in-genraj: *Krupina, Kvilda, Modra, Senica*. Asimilaĵoj: Galanto (ree homonimo), Nitro, Starino, Vinico. Atenton meritas prononcdiferencoj, kaŭzitaj de la nacilingva jotacio. La slovakoj prononcas “*Bratjislava*”, dum en la formo asimilita, la moligo de “t” forestas: Bratislavo. Krome, diferenca akcentado okazas (kp. 3.1.). Alia in-genra finaĵo estas “-á” (prononcu “aa”): *Belá, Dubá, Jarabá, Marcelová*. Asimilaĵoj ĉi-tipaj: Malatino, Plano, Pohorelo, Svinno. In-genra finaĵo estas ankaŭ “-ka”: *Polomka, Turzovka*.

Ekzemplo de vir-genra finaĵo “-ý”: *Slaný* – Slano, de neŭtra finaĵo “-i”: *Oloví* – Olovo.

Eksterordinare ofte oni renkontiĝas kun la pluralforma sufikso plus finaĵo “-ice”: *Pardubice, Zdice*. Asimilaĵoj: Otrokovico, Teplico. Tamen kelkaj “-ice” estas in-genra nominativo singulara: *Mohelnice, Lednice, Levice*. Memkomprene, por esperantigo la distingo ne rolas. Ofta estas ankaŭ la plurala “-ce”: *Gbelce, Jince*. Asimilaĵoj: Medzilaboroco, Sobranco. Pluralforma finaĵo estas ankaŭ “-y”: *Gbely, Klatovy, Malacky*. Asimilaĵoj: Dokso, Lipano, Semilo, Zbeho k.m.a. Ekzemplo de neŭtra pluralo: *Napajedla* (kp. la neŭtran singularon *Sedlo*, 3.1.).

3.4. Forigo de la diakritaj komo aŭ cirklo

La punktoj 3.1. – 3.3. validas por esperantigo el ajna lingvo nacia, sed ekde 3.4. temas pri specifajoj de la ĉeĥa kaj slovak (parte ankaŭ de la serba, litova k.a.), en kiuj vokallongeco estas signata helpe de la diakrita komo: *Kolárovo* (pron. “*Kolaarovo*”, kun akcento sur la silabo unua). Similaj ekzemploj: *Břlsko, Brádló, Komárno, Nálepkovo, Námestovo*. Asimilaĵoj: Komarno, Names-tovo k.t.p. estiĝas do per samtempa aplikado de 3.1. kaj 3.4.

Kombinante 3.2. kaj 3.4., oni povas la vir-genrajn originalojn kun la sufikso “-ín” (legu “-iin”) asimili al: Hodonino, Hulino, Kolino, Merklino, Podivino, Radostino, Radotino, Sobotino, Vsetino k.t.p. La rezultantaj asimilaĵoj en Esperanto aspektas do “inece”. Alia virgenra sufikso “-ík” produktas asimilaĵojn: Javorniko, Jeseniko k.s. Analoge oni asimilas jenajn originalojn: *Bítov, Bruntál, Písek, Tábor, Váh, Vítkov* k.m.a.

Kombinante 3.3. kun 3.4., oni ricevas el *Bílina, Jílové, Kúty, Zázrivá* la formojn: Bilino, Jilovo, Kuto, Zazrivo. Ĉar la ĉeĥa povas signi la longecon de “u” iam ankaŭ helpe de la diakrita cirklo, el *Hůrky* kaj *Medúvka* rezultos

Hurko, Meduvko.

3.5. Ŝanĝo de la diakrita hoko al la tegmento

La ĉeĥa aŭ slovaka konsonanto “ĉ” estas son-identita kun la esperanta “ĉ”; same “ŝ” respondas al “ŝ”. En ambaŭ okazoj sufiĉas do ŝanĝi la supersignojn. Se oni samtempe aplikas iujn el la reguloj antaŭaj, oni povas asimili jene: *Jevičko* al Jevičko, *Košice* al Košico, *Mšeno* al Mšeno, *Opočno* al Opočno, *Prešovo* al Prešovo, *Šahy* al Ŝaho, *Trenčín* al Trenĉino k.t.p.

3.6. Forigo de la diakrita hoko super la konsonato “r”

La ĉeĥa lingvo havas la konsonanton “ř”, kiu estas laŭsone treege simila la la pola “rz”. Kelkiuj opinias, ke ambaŭ fenomenoj estas esperantigendaj kiel “rĵ”, aliaj preferus simplan “ĵ”. Sed al “ĵ” perfekte ekivalentas la ĉeĥa “ž”, nepre ne “ř”. Tial mi forte subtenas la tezon de *Michalski* (1.c.), ke en Esperanto, la pola “rz” estu redonata per simpla “r”, kaj analogan rekomendon mi prezentas por la ĉeĥa “ř”. Ĉi solvo havas plurajn avantaĝojn: grafisman simplecon, fonetikan parencecon, alfabetan vicordon kaj krome: Tre grava cirkonstanco estas tiu, ke la slovaka lingvo, ne havante “ř”, anstataŭigas ĝin per “r”. Similo validas por la lingvoj rusa, serba, bulgara.

Ni komparu la tri eblajn solvojn de la problemo, prenante ekzemple la nomon de la legenda monto *Říp*: Ripo, Rjipo, Ĵipo. Ni tuj vidas, ke “Rjipo” difektas kiel la grafismon, tiel la sonformon originalajn. Per “Ĵipo” krome detruigas la tradicia alfabet-registrado. Jen originalaj ekzemploj kun siaj Esperanto-asimilaĵoj: *Břeclav* – Breclavo, *Březno* – Brezno (fakte ekzistas kaj la ĉeĥa *Březno*, kaj la slovaka *Brezno*), kongruanta laŭ la regulo 3.1. kun la esperantlingva), *Hořovice* – Horovico, *Komořany* – Komorano, *Pruněšov* – Prune-rovo, *Přerov* – Prerovo, *Příbram* – Pribramo, *Říčany* – Riĉano.

3.7. Enkonduko de la diakrita hoko en la diftongon “ou”

Simile, kiel en Esperanto, ankaŭ en la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj ekzistas la diftongoj “au” kaj “eu”. En la loknomoj oni apenaŭ renkontas ilin; sed oftaj ili estas en la fremdaj (ekz. grekdevenaj) vortoj. Krome, la ĉeĥa havas la diftongon “ou”, kiu en Esperanto aperas kiel “oŭ”. Jen du ekzemploj: *Beroun* – Be-roŭno, *Olomouc* – Olomoŭco.

3.8. Anstataŭigo de “ě” per “e”

La ĉeĥa lingvo esprimas moligon (jotacion) de la vokalo “e” helpe de la diakrita hoko, dum en la lingvo slovaka tiu ĉi supersigno mankas. Ekz. la ĉeĥa

“*pěkný*” (prononcu “*peknii*”) signifanta “bela”, sonas slovake “*pekny*” (prononcu “*peknii*”). Ni kontentigu pri du loknomaj ekzemploj: *Mělník* (prononcu “*Mnjelnjiik*”) – Melniko; *Neštěmice* (prononcu “*Neštjemice*”) – Neŝtemico.

3.9 Forigo de la jotaciaj apostrofoj

En la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj oni signas moligon de la konsonantoj “d” kaj “t” antaŭ la vokaloj “a”, “o”, “u” helpe de la jotacia apostrofo. Sammaniere la slovaka lingvo moligas la konsonanton “l”. Jen originalaj ekzemploj: *D’ública, D’umbier, Fil’akovo, Klet’, L’ubica*. Oni prononcas ilin proksimume: *Djaublice, Djumbjer, Filjakovo, Kletj, Ljubica*. Kaj ties asimilaĵoj: Dablico, Dumbiero, Filakovo, Kletjo, Ľubico. En ĉiuj ekzemploj – krom Kletjo – ni neglektis la jotacion. Esperantigante la rusajn loknomojn, oni same procedas, neglektante la jotacion originalan: Dnepro. Al la escepto Kletjo ni revenu ĉi-sekve.

3.10. Konservado de la jotacio vortfina

La lingvoj slavaj (k.a.) havas loknomojn, kiuj finiĝas per la molaj “dj”, “tj”, “nj”. La pola lingvo uzas tiucele la jotacian komon: *Poznań* (prononcu “*Poznanj*”). *Michalski* (1.c.) rekomendas por Esperanto simplan forigon de la jotacio: Poznano. Aliaj aŭtoroj konservas la moligon: Poznanko, eble inspirate de la franca vortfina “-gne”: *Boulogne* – Bulonjo. La rusa lingvo aplikas por moligo de la fina “n” la t.n. “molajn signon”, specialan nelatin-alfabetan literon. Asimilante al Esperanto, oni ofte neglektas la moligon: *Astraĥanj* – Astraĥano. En la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj, tiaspeca jotacio estas signata helpe de la diakrita hoko: *Kadaň, Libuň, Plzeň, Třeboň*. Ĉar en Esperanto oftas la sufikso “-nj-”, oni inklina al jenaj asimilaĵoj: Kadanjo, Libunjo, Pilzenjo (kp. 3.15), Trebonjo. Tamen estas klare, ke sen interkonsento de la slavaj (kaj eble eĉ la neslavaj) esperantologoj definitiva solvo apenaŭ eblos. La jotacia problemoj estas traktata ankaŭ de *Kavka-Pumpr* (1.c., p. 15) konsidere la lok-nomenklaturon el la lingvo rusa.

3.11. Ŝanĝo de “y” (“ý”) al “i”

Ĝis tie ĉi, la esperantigaj modifoj de l’ originalaj formoj estis negravaj, limigite al finaĵoj, supersignoj k.s. Sed nun ni venas al nomoj, postulantaj ŝanĝon de litero mem. Ne mirinde, ke emo al esperantigo ne estos tiom forta. Aliflanke necesas emfazi, ke ankaŭ komunuzaj vortoj, enirante leksikonon de Internacia Lingvo, submetiĝas al la samaj procedoj. Do, anstataŭigo de ipsilono per joto estas la unua el tiaspecaj procedoj: *Kysuca* – Kisuco, *Mýto* (prononcu “*Miito*”) – Mito.

3.12. Ŝanĝo de “ž” al “j”

Kvankam tiu ĉi ŝanĝo tute ne difektas la prononcon de la formo originala, tamen ĝi grave difektas la grafismon: *Ružomberok* – Ruĵomberoko. Plej ĝena ĉi difekto sentiĝas vortkomence: *Žamberk* – ŝamberko, *Žilina* – ĵilino.

3.13. Ŝanĝo de “h” al “g”

Jen temas pri escepta okazo. *Praha* fariĝas Prago (kp. J. KAVKA 1974) sub influo de la formoj latina, germana, franca, rusa, angla k.a., do ne pro postuloj de la fonetiko esperantlingva.

3.14. Ŝanĝo de “ch” al “ĥ”

Ĉi tiu modifo estas tute analoga al 3.12., okazanta pro la fonetika ekvivalenteco. Tamen la difekto de la formo originala povas ĉi-okaze sentiĝi pli grava, ĉar unu literon, nome “c”, oni eliminis: *Chomutov* – Ĥomutovo. (Bonŝance, en la ĉeĥa kaj slovaka alfabetoj, la dulitero “ch” troviĝas najbare, tuj post “h”). Svovaka ekzemplo: *Púchov* – Puĥovo.

3.15. Enmeto de vokalo apud originale silabokrea konsonanto

En la ĉeĥa kaj slovakaj lingvoj funkcias silabokree ne nur vokaloj, sed ankaŭ konsonantoj “l” kaj “r” (en la slovaka krome la longaj “l”, “r”. Memkomprene, en Esperanto, la du konsonantoj ne kapablas tiel funkcii. Ekzistas sola ebleco: enmeti vokalon. Sed kiun vokalon kaj kien? Ĉu antaŭ la konsonanton, ĉu post ĝin? Jen grava problemo, diversmaniere solvebla. Ekz. por la fama bohemia rivero *Vltava* (legu trisilabe: *Vl-ta-va*) jam firme establiĝis la formo kun “u”, metita antaŭ “l”: *Vultavo*. Ankoraŭ por unu ekzemplo ni restu ĉe “u”. La moravia metropolo nomiĝas *Brno* (legu dusilabe: *Br-no*). Ĉar ties latina nomo estas *Brunum* kaj la germana *Brünn*, oni emus esperantigi al Bruno, do ĉi-okaze per postmeto de “u”. Tamen, ĝis hodiaŭ la moraviaj esperantistoj preferas la formon originalan, por alilandanoj apenaŭ prononceblan. Mondkonata estas la pilzenja biero. El la ĉeĥa originalo *Plzeň*, laŭ la modelo germana: *Pilsen*, kreiĝas la formo esperantlingva: *Pilzenjo*.

La ĉeĥlingva dialekto de la nordorienta Bohemio konsekvence evitas la silabokreajn “r” kaj “l”, antaŭmetante “e”: *Kerkonoše* (anstataŭ la korekta *Krkonoše* = Gigantmontaro). La poloj diras: *Karkonosze*. Eble la ĉeĥdialekta procedo konvenus por la ĉeĥaj aŭ moraviaj nomoj kiel *Brdo*, *Kopidno* k.t.p. Ĉu la slovakoj konsentus pri ĝi okaze de *Tnava*, *Trstená* k.a., jen demando. Mi rememorigu pri la tezo, formulita supre, komence de la 3-a ĉapitro: Ju malpli simila al originalo estas loknoma formo en Esperanto, des pli oni inklinas hejmn-

lande preferi la nacilingvan originalon, malgraŭ ties neoportuneco al la buŝo, orelo kaj okulo de esperantisto alilanda.

3.16. Unuformigo de epitetoj laŭ rivero, monto k.t.p.

En PM (1971) ni klopodis unuformigi tiaspecajn epitetojn diverslingvajn laŭ la precedento zamenhofa: Bulonjo ĉe maro. La procedo estas rekomendinda ankaŭ okaze de 1^a analogajoj ĉeĥoslovakaj: *Dubnica nad Váhom* – Dubnico ĉe Vaho, *Jablonec nad Nisou* – Jablonco ĉe Niso, *Kláštrec nad Ohří* – Klaŝtereco ĉe Ohro, *Lipno nad Vltavou* – Lipno ĉe Vultavo, *Mníšek nad Hnilcom* – Mniŝeko ĉe Hnileco, *Ústí nad Labem* – Usto ĉe Elbo (ne ĉe “Labo”, ĉar la internacia nomo de rivero ĉiam estu la parto, enfluanta maron), *Žiar nad Hronom* – Ĵiaro ĉe Hrono k.t.p.

Ĉiam pli kaj pli validas la tezo, ripetita en 3.15. Jam nun mi povas imagi, kiel loka patrioto el *Ústí n.L.* akre protestos kontraŭ “terura kripligo” de la nomo!

3.17. Adapto de duvortaj originaloj

La slovakaj urbo *Banská* (t.s. “mineja”) *Bystrica* fariĝas simple Banska Bistrico (kp. *V. NÁPRSTEK* 1976) kaj fleksiĝas laŭ la gramatikaj reguloj de Esperanto, ĉar temas pri nomo, konsistanta el kliŝa duopo: adjektivo-substantivo. Tamen, *Česká Třebová* ne povas meĥanike fariĝi “Ĉeska Trebovo”, sed oni devas parte traduki al Ĉeĥa Trebovo. Tute same: *České Budějovice* – Ĉeĥa Budejovico. *Hradec Králové* estas alia duopo, konsistanta el la substantivo *Hradec* (t.s. “burgeto”) kaj el la genitiva formo de la substantivigita adjektivo *Králová* (t.s. “reĝ-edzino”), Burgeto de Reĝino. Tamen, la loknomo nepre ne estas tradukenda, sed sole adaptenda al Hradeco Kralova, por esti rekonebla.

Karlovy Vary signifas “Bano de Karolo”. Mi rekomendas la kuntiritan formon Karlovaro, kies adjektivo estas tre bezonata en diversaj disciplinoj: karlovara maklo (en mineralogio kaj petrologio), karlovara salo (en balneologio kaj industrio), karlovara festivalo (en kulturo) k.t.p. Mondkonataj estas la germana nomformo *Karlsbad*, la angla *Carlsbad* k.t.p., sed tiujn la ĉeĥoj ne akceptus kiel bazon por esperantigo.

El slovakaj ekzemploj ni tuŝu almenaŭ unu: *Modrý Kamen* (= Blua Ŝtono). Traduko, ĉu parta, ĉu kompleta, ne estus konvena. Jen eble plej oportuna solvo: Modra Kameno, kvankam sufloranta kvazaŭan ŝanĝon de virgenra nomo al ingenra.

3.18. Laŭsenca traduko

Problemriĉa estas ĉiu duvorta loknomo kun banala epiteto: granda, malgranda, alta, malalta, nova, malnova, norda, suda, orienta, okcidenta k.t.p.

Enkadre de nia traktaĵo ne estus celtrafe, dediĉi al ili tro multe da atento, ĉar unue ne temas pri specifaĵo ĉeĥoslovaka aŭ esperantlingva, due konstatiĝas inklino, traduki sole fizik-geografian nomenklaturon. Neniu dubas, ke ĉiu lingvo rajtas Malgrandazion traduki per siaj propraj rimedoj. En Esperanto plie oni povus heziti kaj diskuti, ĉu ĝi estu Eta, anstataŭ Malgranda Azio. Same, la kontraŭuloj de la prefikso mal- povus preferi Oldan anstataŭ Malnovan Krimeon, Basan anstataŭ Malsupran Tunguskon k.t.p. Certas do tio, ke en la fizik-geografiaj nomoj estas tiaspecaj epitetoj nepre tradukendaj: *Vysoké Tatry* – Altaj Tatroj, *Rudohoří* – Ercmontaro, *České středohoří* – Bohemia mezmontaro. Ankaŭ la jam supre (3.15.) menciita montaro sur la limo bohemia-pollanda: *Krkonoše* – *Karkonosze* estas tradukenda per Gigantmontaro (kp. PIV), kvankam al *Michalski* (1.c.) ĝi ne plaĉas. Fakte temas pri traduko de la germanlingva *Riesengebirge*. Ja ne estus objektive, akcepti en Esperanto nomon, derivitan aŭ el la ĉeĥa, aŭ el la pola formo.

Ankaŭ aliokaze (kp. 3.15.) oni devas helpi sin per la germana lingvo, kvankam en Ĉeĥoslovakio tradicie ne tre populara.

Alia ekzemplo el la sama regiono: La plej alta monto de Gigantmontaro situas precize sur la landlimo ĉeĥoslovaka-pola kaj nomiĝas *Sněžka*, pole *Śnieżka*, germane *Schneekoppe*. Eviti la trioblan nomon por ĉi unusola geografiaĵo oni povas per la laŭsenca traduko: Neĝmonto.

Pri la rivernomo Elbo, ĉeĥe *Labe*, pole *Łaba*, germane *Elbe* ni jam aludis (3.16.), “pri Danubo ne dubo”, ĉar en Esperanto stabiligis la nomo, bazita sur la formo latina: *Danuvius*. Ĉi tiu rivero nomiĝas germane *Donau*, slovake *Dunaj*, hungare *Duna*, serbe kaj bulgare *Dunav*, rumane *Dunărea*. Jen bonega precedentto, ke diversaj nacioj kapablas unuigi koncerne internacilingvan nomon.

Sed ni revenu de la fizikgeografiaĵoj al la urbnoj. Se la bulgara urbo, nomata *Veliko Tarnovo* tradukiĝas ĉeĥlingven kiel *Velké Tarnovo*, ĝi okazas tial, ke ĝi estu fleksebla laŭ la reguloj de la ĉeĥa gramatiko. Pro la sama motivo oni emas traduki la epiteton ankaŭ en Esperanto: Granda Tarnovo (PM 1971). Jen kial ankaŭ la slovaka urbo *Velký Lom* devus esti asimilita kiel Granda Lomo (ne “Velka Lomo”). Simile *Staré Město* devus soni Malnova (aŭ Olda) Mesto, *Spišská Nová Ves* – Spiša Nova Veso, *Vysoké Mýto* – Alta Mito. Tamen, per la parta traduko, la formo asimilita tiom diverĝas de la formo originala, ke oni povas atendi fortan kontraŭstaron al tiaspeca esperantigo. Tial *Michalski* (1.c.) rekomendas ne traduki, sed sole transskribi polajn loknomojn de ĉi tipo: *Zielona Góra* – *Zielona Gora*.

Nu, tia solvo fakte ne estas solvo. Kial transskribi, se la rezultanta formo ne estas fleksebla en Esperanto? Tiukaze estas ja pli bone, lasi la originalon sen ŝanĝo.

Helpe de la jam menciita ekzemplo, ni ankoraŭ resumu ĉiujn eblajn solvojn:

1. *Staré Město* (la formo originala)

2. *Stare Mesto* (la formo, transskribita laŭ la rekomendo de *Michalski*)
3. *Stara Mesto* (la formo laŭ la regulo 3.17.)
4. *Malnova* (aŭ *Olda*) *Mesto* (la parta traduko)
5. *Malnova* (aŭ *Olda*) *Urbo* (la kompleta traduko).

Kvankam la formoj 1. kaj 5. prezentas ekstremojn, tamen ili ambaŭ estas uzataj fakte plej ofte. La formo 5 stabiligis ekz por la historia kvartalo de Prago. Spite la ĝisnunan uzadon, plej akceptinda ŝajnas al ni la formo 4., ne tiom la formo 3., ĉar la regulo 3.17. taŭgas pli bone por aliaj epitetoj ol por la supre menciitaj “banalaj”.

4. Ferma noto

Helpe de pli ol 200 ekzemploj ni provis prezenti la problemaron kaj proponi regularon por ties solvo. Precipe la lastaj reguloj estas ja tre diskutindaj, ĉar tiusfere – pli eble ol logiko – regas “kazuistiko”. Malgraŭ la praktiko ĝis nun hezita kaj nestabiliginta, oni prave atendas iom-post-ioman ellaboron de reguloj pli detalaj. Postulos ĝin la kreskanta internacilingva literaturo regiona (geografia, geologia, arĥeologia, etnografia, dialektologia k.a.).

5. Referencoj

- KAVKA, J.* – *PUMPR, T.* (1972): POŜATLASO DE LA MONDO; Kontribuo al geografia nomenklaturu en Esperanto. – *SCIENCA REVUO*, 3-27. *Beograd.*
- KAVKA, J.* (1974): Kial *Praha*? – *STARTO*, 8, 11. *Praha.*
- KAWASAKI, N.* (1949-1955): Esperantigaj principoj de japanaj vortoj. – *ESPERANTOLOGIO*, 89-97. *Copenhagen.*
- MICHALSKI, T.* (1975): Kiel esperantigi polajn geografiaĵojn. – *POLA ESPERANTISTO*, 16-17. *Warszawa.*
- NÁPRSTEK, V.* (1976): La limo inter verukano kaj verfenio en la ĉirkaŭaĵoj de Banská Bistrica (centra Slovakio). – *GEOLOGIO INTERNACIA*, 51-60. *Varsovio.*
- POŜATLASO DE LA MONDO (1971). *Kartografie. Praha.*

Převod československých místních jmen do esperanta

V esperantu se stále častěji objevují asimilované formy místních jmen. Formy originální bývají buď zcela nepřijatelné (např. jsou-li přejímány z jazyků používajících jiného písma než latinky), nebo působí potíže fonetického rázu, nebo jsou těžkopádné pro svou neohebnost: nelze je skloňovat a tvořit z nich odvozeniny.

V esperantu, tak jako v každém jiném živém jazyku, se projevuje sklon asimilovat především jména fyzicko-zeměpisná. Pokud jde o politicko-zeměpisnou nomenklaturu, mají přednost jména zemí a jejich hlavních měst. Z hledisek čistě jazykových je nejmenší naděje na brzkou stabilizaci v užívání tam, kde asimilované formy se příliš vzdalují od svých originálů.

Na více než 200 příkladech je probráno 18 pravidel převodu z češtiny a slovenštiny do esperanta. Pravidla následují za sebou podle toho, jak stále hlouběji zasahují do originálních jmen. To znamená, že ta, která jsou uvedena mezi posledními, lze označit za nejproblematičtější.

Rozrůstající se regionální literatura krásná i naučná (geografická, geologická, archeologická aj.) si nepochybně vyžádá, aby tato pravidla byla v blízké budoucnosti propracována mnohem podrobněji.

LINGVISTIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO

Aŭtoro: *John C. Wells*, magistro pri ĝenerala lingvistiko kaj fonetiko, lekciisto pri fonetiko en *University College London*.

Eldoninto: *Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado* pri la Monda Lingvo-Problemo. *Rotterdam* 1978.

Enhavo: Jen 76-paĝa broŝuro en tre alloga — eĉ luksa — poligrafia vesto. La longe atendata verko prezentas modernan, altnivele sciencan analizon de Esperanto. Ĝia teksto estas klarstila, ĝia komponicio didaktike perfekta (esence bazita sur serio da ISU-prelegoj).

La partoj estas jenaj: 1. Enkonduko (4 p.), 2. Fonetiko (12 p.), 3. Morfologio (11 p.), 4. Sintakso (16 p.), 5. Leksiko kaj semantiko (15 p.), plus praktikaj aldonaĵoj: bibliografio, indekso de terminoj, fonetikaj simboloj.

Kvankam ĉiuj partoj estas eksterordinare ĝinteresaj, min mem ravis precipe la parto fonetika. Eĉ mi bedaŭris, ne povinte konatiĝi kun aŭtor-opinio pri pliaj fenomenoj fonetikaj, por kiuj la spaco ne sufiĉis (ekz. pri diversaj gradoj de la vokalmoligo post "i").

Prezo de la libro ĉe UEA: 12,00 ned. guld.

La ĉefredaktoro

NE FORGESU VIAN REABONON
POR LA VENONTA JARO — 1979